

La Bulteneto

Nummer 67 - Jahr 2023  Numero 67 - Esperantojaro 137

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN



**LA SVEDO ARNE KARLSSON
SAVIS INFANOJN EN AŬSTRIO**

La Bulteneto

Numero 67  Esperanto-jaro 137

Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko bulteneto

Redaktejo - eldonejo - presejo:

Rudolfnergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio

Tekstoj: Renate kaj Walter Klag

esperanto@chello.at

Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono

Sur la titolpaĝo

Arne Karlsson (links) im Gespräch
mit Wiens Bürgermeister Theodor Körner im Februar 1947.

Arne Karlsson (maldekstre) parolas en februaro 1947
kun la urbestro de Vieno Theodor Körner [téodor kerna].

Foto: Gemeinde Berg, 2413 Berg, Hauptstraße 33.

Arne Karlsson kaj Vieno

La metrolinia sistemo en Vieno kreskas. Post kelkaj jaroj funkcios la nova subtera linio U5. Unu el la novaj haltejoj havos la nomon „Arne Karlsson – Parko“ proksime de la Viena Ĝenerala Hospitalo, ĉe la kruciĝo de Spitalgasse („hospitala strateto“) kaj Währinger Straße [veringa strato] en la 9a distrikto de Vieno. Tie estas la komuna haltejo de sep tramlinioj. Kelkajn metrojn for de tiu parko troviĝas la kafejo AIDA, kie ofte okazas Esperanto-renkontiĝoj. La tiurilatajn informojn vi vidas en Eventa Servo.



La estonta haltejo „Arne Karlsson – Park“ de la konstruata metrolinio U5 en la 9a distrikto de Vieno,
Währinger [veringer] Strato 45.
Fonto: Wiener Linien.

Arne Karlsson naskiĝis 1912 en Stokholmo. Post la Dua Mondmilito, ekde 1945, li laboris kiel estro de la helporganizo "Rädda Barnen Österreich" (Savu la Infanojn en Aŭstrio). Ĉiutage

tiu organizo disponigis 70 mil manĝo-porciojn por la malsata Viena loĝantaro.

La 11an de junio 1947 Arne Karlsson plenumante siajn humanecajn deĵorajn devojn aŭtoveturis apud la aŭstria vilaĝo Berg [prononcu: berg], 60 km oriente de Vieno, ĉe la landlimo inter Aŭstrio kaj tiama Ĉeĥoslovakio, proksime de Bratislavo. Li vojeraris en barita strato kaj komencis turni sian aŭton. Ĝuste tiam militpostena soldato de la rusa okupacia trupo false pensis, ke Karlsson estas spiono kaj ekpafis al la aŭto, en kiu ankaŭ la edzino kaj la infano de Karlsson sidis. Arne Karlsson estis trafita en la kapon postkranie kaj tuj mortis. Li estis nur 34jara.



Ŝildo en Karlsson-Parko. Foto Walter Klag, 2022

Ekde 1961 troviĝas memorejo por Arne Karlsson en Berg (signifas „monto“) ĉe Pressburger Straße (strato al Bratislavo, germane Preßburg aŭ Pressburg).

En Vieno por la memoro al Arne Karlsson oni alinomis 1949 la tiaman Holzknecht-Parkon [holc-kneĥt] al Arne Karlsson-Parko. Ĝi estas unu el la plej grandaj verdaj oazoj en la 9a distrikto de Vieno. La areo estas ĉirkaŭ 12 500 m².




Karlsson-memorejo en Berg, Suba Aŭstrio (Niederösterreich).

Guido Holzknecht (1872-1931) estis tre fama radiologo, universitata profesoro kaj ĉefkuracisto en la Ĝenerala Hospitalo en Vieno. En 1932 post lia tragika morto tiu parka areo ricevis lian

nomon kaj sube de parkarboj staras nun bronza busto, kiu montras la kuraciston.

Origine en la mezepoko sur la loko de tiu parko troviĝis hospitalo kaj ekestis apude tombejo por pestmortintoj en la jaro 1679. Inter 1858 kaj 1860 la Komunumo Vieno konstruis domon por helpobezonaj, maljunaj, malsanaj homoj. 1928 oni malkonstruis tiun domon kaj faris parkon.



La situo de la Berg kaj Bratislavo. Google-maps.



La bakejo AIDA fondiĝis de Josef Prousek. Li naskiĝis 1883 en Držkov [drĵkof], tiam en Aŭstrio, hodiaŭ en norda Ĉeĥio. Post la abituro li lernis la metion kukbakisto. 1912 li edziĝis. Lia edzino estis filino de viandisto. En la jaro 1913 la geedzoj Prousek aĉetis la kukbakejon Bonsaing en la 9a distrikto de Vieno, kiun ili alinomis al

„Chocolaterie (ĉokoladejo) und Gross-Konditorei AIDA Prousek & Co”. La nomo venas de la itala opero Aida, komponita de Verdi, kiun Prousek tre ŝatis.

1938 ekzistis jam 11 filioj de AIDA en Vieno. Post 1945 AIDA liveris interalie kelkajn cent tortojn por la soveta Ruĝa Armeo. Por la usona Ruĝa Kruco AIDA liveris etajn rondajn kukojn „donut” [doŭnat, donat] kaj glaciaĵojn. 1948 remalfermiĝis la filio en la strato Wollzeile [vólcájle] en la unua distrikto. Tiu filio estis la unua kafejo-kukbakejo kun espresomaŝino en Aŭstrio. 1976 ekfunkciis la nova fabriko en la 21a distrikto de Vieno. La entrepreno ricevis ŝtatan distingon en 1980 kaj rajtas uzi la ŝtatan blazonon en komercaj korespondadoj. Aktuale ekzistas 27 filioj en Vieno kaj interalie sur la Viena flughaveno.

Chocolaterie = ĉokoladejo; und Gross-Konditorei = kaj granda kukbakejo; & Co = kaj kompaniano.



La kafejo AIDA, Währinger Straße 47. Foto Walter Klag, 2022

Ligiloj

Pri Holzknecht:

<http://himetop.wdfiles.com/local--files/guido-holz-knecht-s-monument/Guido%20Holzknecht%27s%20monument%2C%20Vienna%20-%202001.JPG>


Pri la monumento en Berg:

https://www.gemeindeberg.at/Lebensraum_Berg/Sehenswuerdigkeiten/Denkmaeler

Renate kaj Walter Klag, Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio



Dum la Dua Mondmilito (1939 ĝis 1945) konstruĝis en la parko du bunkroj, kiuj protektis ĝis 800 personojn kontraŭ bomboj kaj vevenaj gasoj. En unu troviĝas la tiel nomita Memoriga Bunkro. Temas pri muzeo, kiu estas publike alirebla. La alia bunkro estas nun uzata de universitata gimnastejo. Sur la bunkra supro eblas sportumi.



Ne realiĝis la plano konstrui
centran aŭstrian bibliotekon en la 9a distrikto de Vieno.
Tie troviĝas hodiaŭ Arne Karlsson - Parko.
El la gazeto „L’Informateur“, Wien/Paris, 1937.



Guido Holzkecht (1872-1931) estis tre fama radiologo, universitata profesoro kaj ĉefkuracisto en la Ĝenerala Hospitalo en Vieno. En 1932 post lia tragika morto tiu parka areo ricevis lian nomon kaj sube de parkarboj staras nun bronza busto, kiu montras la kuraciston: Pioniro kaj martiro de la scienco.



Fotoj Walter Klag, 2022

Bitte beachten Sie auch
die folgenden Seiten



Floro de frago fotita de Irene Klag 2020

LA MONO DE LA ESPERANTO-KOMUNUMO



Serio 1 + 5 + 10 Steloj, eldonita 1959, prezo de la serio 90 €.



50 Steloj Julia Isbrücker, eldonita 2020, prezo 60 €.



100 Steloj René de Saussure, eldonita 2018, prezo 50 €.

Sendokostoj 10 € por unu paketo. Validas por Eŭro-landoj.

Bonvole sendu vian mendon al esperanto@chello.at.

STELO-TABELO

Nominalo	Materialo	Maso	Dia- metro	Jaro	Eldon- kvanto
1 Stelo	Bronzo	3,4 g	20 mm	1959 ¹	5000
5 Steloj	Latuno	5,0 g	23 mm	1959 ¹	5000
10 Steloj	Cu – Ni	9,0 g	28 mm	1959 ¹	5000
25 Steloj	Cu-Ni 75-25	19 g	37 mm	1965	1000
25 Steloj	Ag 900/1000	25 g	37 mm	1965	5000
25 Steloj	Au 983/1000	50 g	37 mm	1965	10
1 Stelo	Plasto ruĝa	0,8 g	23 mm	2012	3000
3 Steloj	Plasto flava	0,9 g	25 mm	2012	3000
10 Steloj	Plasto verda	1,3 g	29 mm	2012	3000
100 Steloj	Ag 999/1000 ²	31,1 g 1 unco	37 mm	2018 ³	1000
50 Steloj	Ag 925/1000	30,0 g	40 mm	2020	300



Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, g = gramo.

Produktado de la 100- kaj 50-stela monero-medaloj: Münze Österreich.

Produktado de la plastosteloj: Stekelbees, Belgio.

¹ Pregitaj en la jaro 1960

² La monero konsistas 999/1000 el Ag, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Ag-stampo estas 925.

³ Pregita en la jaro 2017

Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam komplete manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la fakgrupo „Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo „Esperanta Numismatiko”, probable la ununura tia fakgrupo en la historio de Esperanto.

La instiga fakto estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian **terminaron**.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum naŭ jaroj ĝis 158 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable por ni kaj vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas **SENPAGE** aliĝi (sufiĉas respondi: „Mi konsentas aliĝi”). Krome la **NUR PERRETA** revuo estas tute **SENKOSTA**! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn, 4 numerojn jare.

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA. Se vi deziras kromajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

Vi rajtas unue peti provnumeron! Vi decidus poste!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de „Esperanta Numismatiko”



Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9
Haltestelle Herrengasse der U3

☎ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h
Donnerstag 10 bis 21 h

Esperantokurse und Führungen auf Anfrage

Im selben Haus befinden sich auch die

Musikaliensammlung

und das

Globenmuseum